

Raportoj de la sekciestro

2005-aŭg-05

1. La estraro de la sveda sekcio de ILEI kunvenos 13 aŭgusto 2005 je la 11 h en Masthuggsliden 1, Gotenburgo.

2. Anna M Ritamäki rekomendas retpaĝon: www.lernu.net/tagovortoj/
(7 aŭg -05 en EAF agadas – Esperanto-Asocio de Finnlando)

Vorto de la tago 2005-08-07 estas

PIKI

- a. *Pli malpli profunde enigi pinton en ion:*

La pikilo de la erinaco pikis al mi la fingron.
Sur la planko estis najlo kaj mi pikiĝis je ĝi.

- b. *Malagrabla kaj akre eksciti la sensojn:*

Estis ege malvarme kaj la frosto pikis mian vizaĝon.

- c. *Koleretigi, inciti, vundeti:*

Pro vorta piko ofte perdiĝas amiko.

- d. *Agrable kaj vigle eksciti la sentojn:*

La pipro iom pikis la langon. ktp...ktp.

Ankaŭ troviĝas arkivo de tagvortoj : www.lernu.net/tagovortoj/arkivo.php

3. SEF apogas la projekton EPoGo – Esperanto por gimnazioj – sed volas recenzon.
Jen ĝi:

La Estraro de SEF,

Leginte la novan lernolibron EPoGo, Esperanto por gimnazioj, de Lars Forsman, Christer Lörnemark, Kjell Randehed kaj Folke Wedlin, mi entuziasmiĝis.

La lernolibro plaĉas kaj al cerbo kaj al koro. Ĝi estas moderna, bela kaj bone strukturita. La enhavo estas varia: faktoj, fantazioj, komentoj, ekzercoj kaj gramatikaĵoj en precize sufiĉaj porcioj.

Oni lernas kiel enmeti la supersignojn en la komputilon. Oni lernas ke troviĝas multaj E-organizoj en la mondo, ke abundas muziko kun tekstoj en Esperanto, ke oni trovas katalogon de E-libroj en www.gotlib.goteborg.se, ke oni povas vojaĝi helpe de

Pasporta Servo k.t.p. k.t.p.

En ĉiu ĉapitro troviĝas proverbo, logante al pripenso kaj diskuto. La gimnazianoj certe rekonas sin en la dialogoj kaj pensoj de Andreo kaj Emma. Pluso, ke ne nur temas pri Svedio sed ankaŭ pri aliaj landoj en Eŭropo kaj eĉ troviĝas mondmapo kun nomoj de ĉiuj landoj.

Grandan zorgeman laboron la verkistoj faris. Se ili volus plian laboron estontece, mi rekomendas ilin ankaŭ adapti ĝin en filmmanuson, ĉar la historio bone taŭgas por televido.

Por ni en ILEI la paketo de EPoGo estas tre uzebla. Estas ja paketo, ĉar krom la ĉefa lernolibro troviĝas ekzerclibro, manlibro kaj KD. Ĝi estas uzebla ne nur en gimnazioj sed ankaŭ por aliaj kursoj kaj por memstudado. En la distanckurso de la universitato de Umeå oni elektis ĝin kiel ĉefan lernolibron.

Ni nur volus ke EPoGo estu pli facile havebla, kaj nombre kaj preze.

Gotenburgo, la 5:an de aŭgusto 2005.

Siv Burell

sekciestro de la sveda sekcio de ILEI

© Svenska sektionen av ILEI, <http://ilei.info/svedio>